

# **Raporto pri la Esperanto-agado en COP20 (Limo - Peruo)**

**Alvaro Motta**

**Tago de vojaĝo de Rio de Janeiro al Limo:** 29-a de novembro 2014

**Tago de reveno (Limo – Rio de Janeiro):** 13-a de decembro 2014

**Tranoktado en Limo:** gastigado ĉe la domo de perua amikino.<sup>1</sup>

En Limo la ĉefaj eventoj estis:

- 1) la oficiala evento de UN (COP20) de la 01-a ĝis la 12-a de decembro
- 2) la paralela evento "Voĉoj por la Klimato" (Voces por el Clima) de la 01 ĝis la 12-a de decembro
- 3) la ne-oficiala evento de la sociaj movadoj "Kunveno de la Popoloj" (Cumbre de los Pueblos) de la 08-a ĝis la 11-a de decembro

Okazis aliaj malgrandaj paralelaj eventoj, tamen mi raportos nur pri tiuj 3 al kiuj mi iris.

## **1) La oficiala evento de UN (COP20) – de la 01-a ĝis la 12-a de decembro en Limo**

**Loko: sidejo de la perua armeo (Pentagonito), en kvartalo San Borja**

Mi ne partoprenis en tiu ĉi, ĉar UEA ne estis oficiale enskribita al ĝi. Christian Herrera, kiun mi kaj Rafael Zerbetto konis dum Rio+20, proponis al mi enskribiĝi oficiale en COP20 pere de la akreditiĝo de sia organizo "Time to Act".

Christian estas peruano kaj partoprenis en la konkurso de la video "Date with History", kiun Rafael same partoprenis kaj por kiuj esperantistoj amase voĉdonis en 2012.

<sup>1</sup> En Limo, mi restis en la domo de perua amikino, Yuri, kune kun sia familio. Mi intencis gastigi ĉe junulargastejo, sed ili insistis ke mi restu ĉe ilia domo. Ili estis tre afablaj kaj donis grandan helpon al mi dum mia restado en Limo kaj en la unua tago eĉ akompanis min ĝis la lokoj de la evento por min gvidi. Speciala afero dum mia restado tie estas ke la patrino de mia amikino estas denaska parolantino de la lingvo ajmara kaj ŝia patro estas denaska parolanto de la keĉua. Malgraŭ tio, bedaŭrinde mia amikino parolas nek la ajmaran nek la keĉuan. Estis vere riĉiga sperto aŭskulti de la gepatroj de mia amikino la malfacilaĵojn, kiujn ili trapasis pro la lingvaj baroj. Ili volis instrui al mi kelkajn vortojn de siaj denaskaj lingvoj kaj sentis sin feliĉaj, ke iu persono interesiĝas pri ilia lingvo. Kvankam mia amikino ne estas esperantistino, ŝi jam frekventis kelkajn klasojn de Esperanto en Limo, kiam mi estis tie antaŭ 5 jaroj.

Christian havis la videon kun pli da voĉdonoj en Interreto kaj Rafael estis en la 3-a loko en tiu tempo. En la suba ligilo estas foto de la venkintoj de “Date with History” kune kun Severn Suzuki (la tiama knabino, kies parolado furoris en RIO92). Komencante de la maldekstra: Severn Suzuki , Alexandra Alhadeff , Christian Herrera, Brittany Trilford kaj Rafael Zerbetto.

[http://www.esperanto.com.br/wp-content/uploads/2012/07/DSC\\_0229.jpg](http://www.esperanto.com.br/wp-content/uploads/2012/07/DSC_0229.jpg)

Danke al la helpo nia, Christian sukcesis prezenti sian laboron dum Youth Blast en Rio+20, ĉar ni pruntedonis al li nian projekcion, kontraŭe li eble devus prezentiĝi sen la uzo de lum-bildoj. Pro tia kunlaboro nia en 2012, li proponis enskribi min en la listo de akredititoj de sia NRO por COP-20 pasintan jaron. Mi demandis al Rafael Zerbetto kaj al Fernando Maia, ĉu mi povus enskribiĝi kiel reprezentanto de BEJO (Brazila Esperantista Junulara Organizo) en COP20 kaj ili plene aprobis<sup>2</sup>. Christian poste avertis min, ke eble li ne sukcesos enskribi min, ĉar la listo de interesiĝantoj en COP20 estas tre granda kaj probable lia organizo ricevus malmulte da partopren-permesoj aŭ eĉ nur unu. Bedaŭrinde, en la fino Christian fakte ne havis alian disponeblan partopren-permeson kaj mi ne povis akreditiĝi al COP20.

### **1.1) Akreditiĝo de UEA por venontaj COP:**

UEA ne akreditiĝis al COP20, ĉar tio devus esti farita unu jaro antaŭ la komenco de la konferenco. En COP19, la lim-dato estis 6 monatoj antaŭ la evento. Ĉar pli kaj pli da organizoj volas partopreni en ĝi, la lim-dato estas pli kaj pli frua. Ekzemple, la lim-dato por aliĝi al COP21, kiu okazos en Parizo, decembre ĉi-jare, estis la 31-a de aŭgusto 2014 (unu jaro kaj duono antaŭ la komenco de la konferenco!) Por COP22, kiu okazos en 2016 en Maroko (Afriko), la lim-dato por akreditiĝo estos la 31-a de aŭgusto de 2015 (do mankas nur pli ol unu monato por akreditiĝi).

La ĉef-paĝo por aliĝi al la venontaj COP estas la jena:

[http://unfccc.int/parties\\_and\\_observers/ngo/items/3667.php](http://unfccc.int/parties_and_observers/ngo/items/3667.php)

Mi alkroĉas la dosieron, kiu informas la dokumentojn necesajn por fari la registriĝon. Eble la plej malfacilaj dokumentoj rilatos al la numeroj 7 kaj 8, kiuj petas la jenon:

*7. Information on activities undertaken by the organization in the last 12 months that indicate the competence of the organization in matters relating to the UNFCCC, such as newsletters and other publications;*

*8. Information on the affiliation of the organization with other non-governmental organizations or networks involved in climate change activities;*

2Ĉar mi havis malpli ol du tagojn por respondi al Christian, mi preferis rekte provi reprezentiĝi kiel BEJO-ano, ĉar por esti reprezentanto de UEA aŭ TEJO, tio postulus la konfirmon de la estraroj de tiuj organizoj kaj tio povus daŭri sufiĉe longe.

## 1.2) Lernintaj lecionoj:

- a) Estas tre grave kunlabori kun aliaj NROj, ĉar en tiaj situacioj ili povas akreditigi nin, okaze ke ni ne estas oficiale enskribitaj en internaciaj eventoj. Imagu se Greenpeace, Oxfam, MSF, Internacia Amnestio, Survival kaj aliaj grandaj NROj volus kunbatali kun ni por defendi lingvajn rajtojn? En internaciaj konferencoj ili povus multe helpi nin.<sup>3</sup>
- b) Unu afero postulata en la akreditigo por COP22 estas la prezento de kunlaboro fare de la organizo pri la temo klimat-ŝanĝiĝo. Bedaŭrinde mi ne konas iun laboron de UEA, kiu traktas rekte tiun temon. Kiel rilati Esperanton ne nur al klimat-ŝanĝiĝo, sed al la aliaj temoj de la daŭripovaj evoluaj celoj de UN? Eble specifa kaj konstanta kolumno pri daŭripovaj temoj en la revuoj Esperanto kaj Kontakto povus helpi tiucele. Aŭ eldonado de esperantaj libroj aŭ broŝuroj pri ekologiaj temoj kun la oficiala etikedo de UEA. Alia afero povus esti revigligi la ideon organizi radi-programoj pri la Internaciaj Tagoj de UN por Radio Muzaiko.
- c) En Rio+20, mi memoras, ke estis granda bruo pri la propono aligi esperantan organizon, kiel TEJO, al la reto de NROj GCCA (Global Call for Climate Action). (<http://tckctck.org/>). Tiam, estis kelkaj plendoj ke TEJO ne devas sin trudi en tiu temo de klimat-ŝanĝiĝo, ĉar tio rompus la neŭtralecon de Esperanto. Pro tiu afero, en tiu tempo nur BEJO (Brazila Esperanta Junulara Organizo) aliĝis al tiu koalicio GCCA, kie estas aliaj gravaj organizoj kiel Skoltoj, Ruĝa Kruco, Greenpeace, WWF, Internacia Amnestio, AVAZZ, Oxfam, ktp. (<http://tckctck.org/2012/05/bejo/26377>). Danke al tiu partopreno de BEJO en GCCA, Rafael Zerbetto povis interagi kun pluraj aliaj NROj kaj koni multajn aktivulojn dum Rio+20. Estis ankaŭ GCCA, kiu organizis tiun kampanjon "Date with History", por kiu Rafael faris la videon kaj por kiu ĉiuj esperantistoj voĉdonis.

**Komento:** Mi sentis grandegan ĝojon, kiam mi legis la kolumnon "Malferme" de la januara eldono de la revuo Esperanto verkita de Mark Fettes (*Tuopintoj kaj turnopunktoj*). Ĝi tre saĝe esprimas la vojon de nia movado kaj klarigas ke neŭtraleco ne devas signifi izolatecon.

3 Pri kunlaboro kun Greenpeace: En 2012 mi tradukis la filmeton "The Story of Stuff" al Esperanto, sed mi ankoraŭ ne sendis ĝin al la NRO "Story of Stuff", kiu respondecas pri la filmeto. Mia intenco estis skribi leteron al Annie Leonard, la tiama prezidantino de la organizo kaj reĝisorino de la filmeto, provante konvinki ŝin fari alian similan filmeton pri la problemoj de lingvaj rajtoj en internacia komunikado kaj la malapero de kultura diverseco. La traduko de la filmeto "Story of Stuff" povus esti unu maniero altiri ŝian simpatian al Esperanto. Annie Leonard nun ne plu estas antaŭ la organizo "Story of Stuff", ĉar ŝi fariĝis prezidantino de Greenpeace Usono. Se "Story of Stuff" farus tiun filmeton, mi kredas ke ni certe ankaŭ havus la apogon de Greenpeace, kiu estas forta kaj influa organizo. Mi devas ankoraŭ fini la revizion de la traduko de la filmeto. Mi pardonpetas, se ĝis nun mi ne sukcesis konkludi tiun laboron.

## 2) “Kunveno de la Popoloj” – de la 8-a ĝis la 11-a de decembro

### Loko: Parko de la Ekspozicioj

Mi faris la enskribiĝon por tiu ĉi evento kaj proponis prezentadon pri Esperanto kaj same petis budon por ekspozicii materialon. Ĝenerale, en tiuj konferencoj, la organizantoj ĉiam substrekas, ke la aktivaĵoj devas esti organizitaj kune kun aliaj NROj kaj ne izolece. Ĉar mi ne konis aliajn NROjn, mi proponis fari ĝin kune kun **AVE kaj Mond-Civitanoj**.

Antaŭ vojaĝi al Peruo, mi ne havis informojn ĉu la organizantoj akceptus aŭ ne la proponon de UEA rilate al la aktivaĵoj pri Esperanto. Nur du tagoj antaŭ la komenco de COP20, mi ricevis la finan version de la programo. Bedaŭrinde en ĝi estis neniu programero rezervita por ni nek budo.

Al la evento “**Kunveno de la Popoloj**” mi iris en la unua tago (08-a de decembro), malgraŭ ke nia programero ne estis akceptita. En tiu tago, mi povis renkontiĝi kun du aliaj peruaj esperantistoj, Carlos Miranda kaj Mario Serĝio. Ili alvenis al la kunveno de la popoloj posttagmeze por helpi min. Carlos donis al mi kelkajn flugfoliojn, kiujn li pretigis pri Esperanto por disvastigi en Peruo. Tiuj flugfolioj estis tre utilaj, ĉar mi vojaĝis al Peruo sen multaj flugfolioj. Bedaŭrinde por la aliaj tagoj, la peruaj esperantistoj ne povis multe helpi min, ĉar ĉiuj devis labori.

Dum nia ĉeesto en la Kunveno de la Popoloj, ni klopodis disvastigi pri Esperanto al la partoprenantoj, ĉefe al indiĝenoj. Ili estis la plej malfermaj homoj al la ideo de internacia lingvo, ĉar ili sentas ke la plej granda minaco al sia kulturo estas la perdo de sia denaska lingvo.

Tiu estis la nura tago, kiun mi iris al la Kunveno de la Popoloj. Por ĉiuj aliaj tagoj, ekde mia alveno al Peruo mi ĉiam iris al la evento “**Voĉoj por la Klimato**”. La strukturo de la ne-oficiala evento "Kunveno de la Popoloj" (*Cumbre de los Pueblos*) estis multe pli simpla, kompare al tiu de "Kupolo de la Popoloj" (*Cúpula dos Povos*) en Rio+20.

Ĉar mi estis laborante sola en Peruo en preskaŭ ĉiuj tagoj, escepte la unuan tagon de la Kunveno de la Popoloj, mi devis koncentri mian agadon nur en la disvastigo de Esperanto. Bedaŭrinde, mi ne povis klarigi aŭ ekspozicii al la ĉeestantoj pri la laboro de AVE kaj de Mond-civitanoj.

### 2.1) Akreditiĝo de UEA por venontaj Kunveno de la Popoloj:

Mi ankoraŭ ne sukcesis vidi la ret-paĝon de la paralela kaj ne-oficiala evento Kupolo de la Popoloj por COP21 en Parizo. Ĝenerale la Kupolo de la Popoloj estas malferma al la publiko sen la neceso akreditiĝi. Unu afero ege grava por sukcesi havi spacon por prelegi aŭ eĉ ekspozicii estas klopodi proponi programeron kune kun aliaj NRO-j.

### 2.2) Lernintaj Lecionoj:

- a) Mi nur havis la flugfoliojn de la UK de Bonaero, kiu estis tauga por Argentino, sed ne por Peruo. (Poste Adrián Alejandro el Argentino informis al mi dum la Brazila Kongreso de Rio en januaro, ke eĉ la retejo menciita en tiu flugfolio ne

plu validas). Bedaurinde mi ne havis tempon por pretigi taugan flugfolion por COP20 en Peruo. Por la venontaj COP estus tre bone havi flugfoliojn kun taŭga teksto por la publiko de tiu konferenco. Kaj estus bone havi almenaŭ unu flugfolion en la angla por eksterlandanoj kaj alia en la lingvo de la gastiganta lando de COP (por lokanoj).

- b) Denove evidentiĝas la graveco starigi long-daŭran rilaton kun aliaj NRO. Se ni estus proponanta programeron kune kun aliaj fortaj NROj la ŝancoj havi ĝin akceptita fare de la organizantoj de la evento estus multe pli granda.

### **3) “Voĉoj por la Klimato” (Voces por el Clima), de la 01-a ĝis la 12-a de decembro**

**Loko: Ĉeval-kuireja Klubo (Jockey Club), kvartalo Surco**

Mi iris al “Voĉoj por la Klimato” en preskaŭ ĉiuj tagoj, escepte la 8-an de decembro (tago de la “Kunveno de la Popoloj”) kaj la semajn-finon de la 6-a ĝis la 7-a de decembro, ĉar mi malvarmumis. Tiu estis la loko en kiu mi vere agadis la plejparton de la tempo. Mi kredas ke en Parizo (COP-21) ankaŭ ekzistos spaco kun tia strukturo malfermita al la publiko organizita de la registaro.

Tiu paralela evento havis tre interesajn ekspozicion kaj prelegojn kaj foiron kun pluraj budoj. La plej interesa parto de tiu foiro estis la Indiĝena Pabelono. Ĝi estis la unua fojo en la historio de COP, kiam la indiĝenoj havis specialan reprezenton same kiel jam okazas ĉe aliaj gravaj konferencoj de UN. En la konferencoj de UN ĉiam estas rezervita spaco por junuloj, por ECOSOC<sup>4</sup> kaj ankaŭ indiĝenaj popoloj. Sed en COP, ĝis tiam tio ne okazis al la indiĝenoj. Sekve COP20 estas la unua fojo, kiam indiĝenoj havas tiun rajton kaj tio ripetiĝos en la venontaj COP.

La Indiĝena Pabelono kunvenigis indiĝenojn el pluraj partoj de Ameriko kaj eĉ kelkajn reprezentantojn de indiĝenaj popoloj de aliaj landoj (tamen tiuj ĉi lastaj estis malmutaj). En COP21 de Parizo la franca registaro promesis starigi denove alian Indiĝenan Pabelonon.

Kompare kun la ne-indiĝenaj partoprenantoj, mi povas diri ke la indiĝenoj estas multe pli malferma al la ideo de internacia neŭtrala lingvo. Ili sentas sin tre fiera, kiam oni demandas pri ilia lingvo kaj kulturo. Estis por mi interese demandi kaj kompili malgrandan liston kun la vorto “Dankon” en kelkaj amerikaj indiĝenaj lingvoj.

Rilate al lingvaj baroj, tre kurioza afero okazis en Voĉoj por la Klimato. Dum la oficiala kunveno de UN kalkulis je dungitaj profesiuloj por traduki la paroladon en fremdaj lingvoj (kaj tiuj profesiuloj sendube ricevis tre altajn monsumojn), en la Indiĝena Pabelono ĉiuj tradukistoj laboris volontule. Ĉiuj estis junuloj. Unu el la prelegantoj de Voĉoj por la Klimato eĉ plendis ke unu el la plej grandaj elspezoj de COP-20 estis la servo de tradukado. Mi ege kompatis la indiĝenojn, kiuj havis grandan malfacilaĵon por kompreni paroladojn faritaj ne nur en la hispana, sed ankaŭ en la angla, en la portugala

4 ECOSOC – United Nations Economic and Social Council (Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj)

kaj la franca. Tre mirindan laboron faris tiuj junuloj, kiuj volontule tradukis la paroladojn. Ĉe la fino de la konferenco mi iris al ilia budo kaj dissendis flugfoliojn pri Esperanto al ĉiuj el ili. Ege mirinde, ke ĉiuj tre simpatiis al Esperanto kaj komprenis ĝian gravecon. Unu el la aferoj, kiuj plej vekis ilian atenton estis la traduko de la libro “La Hobito”, kiun mi kunportis por montri al ili, kune la bildstrio de “Asterikso”. Al la junuloj ege plaĉis ke Esperanto ankaŭ povas esti uzata por legi junajn kaj amuzajn librojn. Tio estis la sama sperto, kiun mi havis en Rio+20.

Mi parolis kun juna ĉadino, kiu estis reprezentantino de indiĝena etnio de Afriko. Mi donacis al ŝi unu broŝuron “Malkovru Esperanton” en la angla kaj ŝi respondis al mi, ke ŝi aŭskultis pri Esperanto en Kenjo de sia instruisto, kiu multe apogis ĝin. Mi sendas foton de ŝi en la Voĉoj de Klimato.

Dum la evento mi vizitis plurajn aliajn budojn kaj pabelonojn. Mi ĉiam kunportis en mia valizo flugfoliojn kaj kelkajn librojn en Esperanto por montri al la homoj al kiuj mi alparolis. La libroj kaj revuoj, kiuj mi ĉiam havis en mia dorsosako estis:

- la Jarlibro de UEA;
- la lasta eldono de Pasporta Servo 2011;
- La Hobito;
- la bildstrio en Esperanto de Asterikso;
- kelkaj eldonoj de la revuoj Esperanto kaj Kontakto.
- La libro “Imperiaj Ambicioj” de Noam Chomski.

Ankaŭ multe helpis min la vizit-kartojn de Radio Muzaiko, ĉar homoj multe impresiĝis, kiam ili eksciis ke ekzistas radio kun muzikoj en Esperanto.

Por alparoli al la homoj pri Esperanto, mi unue interŝanĝadis informojn kun ili pri la temo de la konferenco: Klimat-ŝanĝiĝo. Poste, mi sin prezentis dirante ke mi reprezentas UEA-n, kiu laboras por la disvastigo de Esperanto kaj pri lingvaj rajtoj. Tiam mi klarigis al la homoj pri la lingvaj baroj de la konferenco kaj pri la neceso protekti kulturen diversecon. Se ili montradis intereson, mi montradis al ili kelkajn librojn en Esperanto, disdonadis la flugfoliojn kaj prenis la kontakton. Se ne, mi simple dankadis la babiladon kaj sekvis antaŭen. Tion mi faris en preskaŭ ĉiuj tagoj de la konferenco.

En la Indiĝena Pabelono ĉiam estis prelegoj fare de indiĝenoj aŭ ligitaj al la indiĝena defio por alfronti klimatan ŝanĝon.

### **3.1) Mia parol-interveno en la Indiĝena Pabelono:**

Ĉe unu specifa programero de la Indiĝena Pabelono prelegis kelkaj talentaj kaj aktivaj junaj indiĝenoj pri sia vivo en universitato. Tiuj junuloj bezonis forlasi sian familion en la indiĝena vilaĝo por studi en la Universitato de Limo en Peruo en programo starigita de la registaro por supera edukado de indiĝenoj. Ĉiuj el ili parolis en la hispana,

malgraŭ ke ilia denaska lingvo estis indiĝena. Ili rakontis pri la kultura ŝoko, kiam ili alvenis al la urbo kaj ne estis al kutimiĝintaj uzi la kranon kaj la necesejan vazon. Post ilia prelego, mi faris intervenon. Mi sin prezentis kiel esperantisto kaj laŭdis ilin pro la defio paroli en fremda lingvo (hispana) kaj klarigis pri la graveco protekti lingvan diversecon en la mondo. Mi diris ke ekzistas pli malpli 7 mil lingvoj en la mondo kaj ke en ĉiuj du semajnoj unu lingvo malaperas kaj kun ĝi la tutan kulturon de iu popolo. Mi same klarigis, ke en Brazilo ni havas 180 indiĝenajn lingvojn kaj ĉiuj el ili estas taksataj kiel endanĝerigitaj lingvoj fare de UNESKO. Mi informis, ke Esperanto laboras por la defendo de lingvaj rajtoj. Kaj ke por internaciaj forumoj ĝi estas la plej demokrata kaj efika ilo por justa komunikado. Mi petis al ĉiuj indiĝenoj de la ĉambro kunigi fortojn por la defendo de lingvaj rajtoj en Internaciaj Forumoj, kiel COP kaj aliaj eventoj, ĉar la lingvo estas la plej grava trajto de la kulturo de unu etnio. Post la fino de tiu parolado kelkaj indiĝenoj alproksimiĝis al mi por demandi pri Esperanto. Unu el ili, eĉ ret-mesaĝis al mi montrante intereson starigi kuran laboron inter sia organizo kaj Esperanto. Bedaŭrinde pro mia intensa labor-ritmo dum tiu ĉi jaro, mi ne multe povis skribi al li kaj proponi iun specifan kunlaboron. Li estas reprezentanto de indiĝenaj etnoj de Perua Amazonio. Mi same kontaktis alian reprezentanton de indiĝenoj de Brazila Amazonio.

### **3.2) La plej grava lerninta leciono por mi:**

Se ni esperantistoj volas defendi la minoritatojn, kiuj suferas pri lingva diskriminacio, tiuj minoritatoj estas la indiĝenoj. Inter la 6.000 kaj 7.000 lingvoj parolataj en la mondo, 96% el ili estas parolataj nur de 3% el la tutmonda loĝantaro. Kaj la plej granda parto de tiuj lingvoj temas ĝuste pri indiĝenaj lingvoj. En Brazilo, ekzemple, kie pli ol 99% de la loĝantaro havas la portugalan kiel denaskan lingvon, malpli ol 1% de la loĝantaro parolas la 180 indiĝenajn brazilajn lingvojn. Kaj tiu bildo ripetiĝas en aliaj amerikaj landoj, en Oceanio kaj certe ankaŭ en Afriko kaj en Azio.

La indiĝenoj estas tre influaj en internaciaj eventoj. Ili estas tre grava forto en tiu movado por bloki la malrespekton al homaj rajtoj. Estos ĝuste ili, kiuj helpas bloki la mortigon de lingvoj kaj kulturoj fare de nia maljusta ekonomia sistemo.<sup>5</sup>

5 Nuntempe mi legas la libron de la ĵurnalistino Naomi Klein, "Climate x Capitalism: This changes everything" (Klimato x Kapitalismo: tio ŝanĝas ĉion). Ŝi mencias ke pli kaj pli aliaj "blankulaj" organizoj kunbatalas kun la indiĝenoj por la indiĝenaj rajtoj, ĉar ili scias ke se la indiĝenoj estas malrespektataj, poste estos la "blankuloj" kiuj suferos la konsekvencojn. Naomi Klein faras referencon, ekzemple, al la epizodo de mobilizo de indiĝenoj kaj blankaj lokanoj por bloki la konstruon de oleodukto por la oleaj sabloj en Kanado. Danke al la blokado de tiu oleodukto ili helpas protekti ne nur la akvon de sia regiono sed ankaŭ la klimaton. Sekve, ĉiuj homoj de la planedo gajnas pro tio. Tio aplikiĝas ne nur al la klimato, sed al pluraj aliaj kampoj. En tiu senco mi same aldonus la lingvan kampon. Se ni defendas la rajtojn de indiĝenajn lingvojn, ni ankaŭ helpas fortikigi la ideon pri bezono de pli justa komunikado en internaciaj forumoj kaj sekve pri la valoro de Esperanto. En la fino la tuta homaro gajnos pri tiu agado. Ŝi kreis unu terminon por tiuj rezistaj movadoj: "Blockadia". Laŭ ŝi, estos ĝuste tiuj pacaj kaj rezistaj movadoj (civila malobeo), kiuj sukcesos haltigi la detruon de la planedo. En la libro ŝi ankaŭ alvenas al grava konkludo: nia nuna kapitalisma sistemo ne estos kapabla solvi la gravegajn defiojn de la klimato. Kiel bone diris unu interesa frazo, kiun mi vidis dum la Kunveno de la Popoloj en Peruo: "ne ŝanĝu la klimaton, ŝanĝu la sistemon".

La esperantistoj en Ameriko kaj Oceanio havos tre fortan apogantaron se ili kunigos siajn fortojn al la indiĝena movado. Bedaŭrinde, en Brazilo homoj ankoraŭ dormas pri tio kaj mi devas konfesi tre ĉagrenite, ke multaj eĉ havas antaŭjuĝojn kontraŭ ili.

Mi proponis, ekemple, por la pasinta Brazila Kongreso de Esperanto en Rio de Janeiro, prelegon fare de reprezentantoj de minoritataj lingvoj pri la nuntempa defio prizorgi sian lingvon. Oni malpermesis al mi fari tion, ĉar mi ne scias kial, LKK-anoj kreis regulon jenan: “en Esperanto oni povas prelegi pri ĉio, sed en la portugala nur pri Esperanto”. Kaj pro tia fermiteco kaj izoliteco, oni eĉ ne pridiskutis ke Brazilo havas 180 indiĝenajn lingvojn minacatajn malaperi laŭ UNESKO aŭ kiamaniere ni esperantistoj povus helpi konsciigi brazilanojn pri tio. Ni havas indiĝenajn popolojn en Brazilo, kiuj ankoraŭ vivas izolitaj de la civilizacio kaj pri kiuj oni eĉ ne scias, kiujn lingvojn ili parolas.<sup>6</sup>

Mi pensas ke niaj landaj kongresoj de Esperanto en Ameriko, ekzemple, ĉiam devus havi spacojn por pridiskuti la situacion de lingva diverseco en la lando. Eble povus esti interese se UEA sendus unu peton al la landaj asocioj proponante inkluzivigi en la programo de siaj regionaj kongresoj spacon por pridiskuti la lingvajn rajtojn de la minoritataj etnoj de la lando.

### 3.3) Lernintaj Lecionoj:

- a) Labori pli aktive kun la indiĝena movado. Ĝi povos esti la pordo per kiu Esperanto akiros la apogon de pluraj aliaj NROj, kiuj okupiĝas pri malsamaj temoj, kiel ekzemple, Greenpeace, Internacia Amnestio, ktp. La indiĝena movado estas tre forta kaj influa.
- b) Mi scias, ke homoj jam laboras pri tio, tamen valoras reliefigi la gravecon por nia movado havi ret-paĝon kun materialoj en pluraj lingvoj por la disvastigo de Esperanto, simile al la tre bona ret-paĝo 350.org. Tie jam ekzistas ne nur pretaj flugfolioj por printi, sed ankaŭ modelojn de T-ĉemizoj, de prezentado en PPT por prelegoj, ktp. (<http://350.org/>) Tio faciligos la laboron de nia disvastigado.
- c) Estus tre bone havi ankaŭ flugfoliojn pri Esperanto kunfokuso en lingvaj rajtoj kaj minoritataj lingvoj, ĉefe se oni intencas labori pli proksime al indiĝenaj popoloj. Eble oni eĉ povus fari du malsamajn flugfoliojn por malsama publiko. En la budo de la Ministerio pri Kulturo de Peruo mi prenis flugfolion tre interesan pri la indiĝenaj lingvoj de Peruo kaj siaj parolantoj (Mi alkrōcis la dosieron de tiu flugfolio en la hispana).
- d) Unu bone kaj bele farita T-Ĉemizo donas impreson de forta organizo al la ekstera publiko. En Rio+20, mi eĉ memoras, ke multaj homoj volis aĉeti niajn T-

<sup>6</sup> Oni kredas, ke ankoraŭ povas ekzisti inter 30 kaj 20 izolitaj indiĝenaj popoloj en Brazilo, ĉefe en Amazonio. Pro la detruo de la arbaro kaj la premo de grandaj novaj projektoj kiel akvo-elektrikaj plantoj kaj minejoj, tiuj popoloj vivas sub konstanta minaco. Tre interesa filmeto de 3 minutoj farita de BBC kun la NRO Survival montras unu el tiuj izolitaj indiĝenaj popoloj en la landlimo de Brazilo kaj Peruo: (<http://www.uncontactedtribes.org/brazilfootage>)



ĉemizojn, sed ni ne povis vendi ilin tie. Mi opinias, ke unu bona T-Ĉemizo devas havi en tre grandaj literoj la vorto “**Esperanto**”. La plej maltaŭga T-Ĉemizo por disvastigado estas tiu, kiu kaŝas la vorton Esperanto aŭ eĉ ne mencias ĝin.

- e) Alia tre bona afero estas havi rubandon kun la vorto “**Esperanto**” en grandaj literoj. En Rio+20, ni havis tiun rubandon kaj multaj homoj volis foti kun ĝi, ĉar la rubando havis la flagetojn de pluraj landoj. Mi sendos la foton de tiu rubando. Bedaŭrinde en Limo, mi ne havis rubandon, nur la flagon de Esperanto. Tamen dum la flago signifas tre multe por esperantistoj, ĝi klarigas absolute nenion al homoj, kiuj ne konas Esperanton.
- f) Krom la flug-folioj, estas ĉiam grave havi kelkajn interesajn materialojn en la dorso-sako por elmontri al la homoj. Se oni havos spacon por ekspozicii la materialon des pli bone. Kiel mi diris, mi ekzemple kunportis en mia dorso-sako la Jarlibron, la libreton de Pasporta Servo, la librojn “La Hobito” de Tolkien kaj “Imperiaj Ambicioj” de Noam Chomski, la bildstrion “Asterikso” kaj kelkajn ekzemplerojn de la revuoj Kontakto kaj Esperanto. Por reklami pri muzikoj en Esperanto, la vizit-kartoj de Radio Muzaiko ankaŭ estis tre valoraj.
- g) Por partopreni en tiuj konferencoj estas tre grave ne altrudi Esperanton al la homoj, sed dialogi kaj aŭskulti. Oni povas multe lerni en tiuj eventoj. Ĉiuj havas iun interesan ideon kaj viv-sperton por interŝanĝi.

#### 4) Lastaj Rimarkoj:

En mia antaŭ-lasto tago en Limo, mi povis renkontiĝi kun lokaj peruaj esperantistoj en restaŭracio, kie ni vespermanĝis tipan ĉin-peruan manĝaĵon. Ili tre afable donacis al mi belan pentraĵon kun la kamparaj pejzaĝoj de Peruo. En la renkontiĝo estis Carlos Miranda, Julio Zevallos, Hector kaj alia perua sam-nomulo Alvaro.

Lasta kuriozaĵo pri Limo: Ĝia nomo venas el la keĉua nomo de la rivero, kiu trapasas la urbon: la rivero Rimac. Rimac en la keĉua signifas “Parolanta Rivero”, ĉar dum la degela sezono la rivero faras grandan bruon, kiam la akvo ŝokiĝas kun la ŝtonoj. Ĉar la hispanoj ne bone scipovis prononci la vorton “Rimac”, la ĉefurbo de Peruo fariĝis “Lima” (Limo). Tre inspiriga nomo por esperantistoj kiu bezonas paroli en Internaciaj Konferencoj!

Finfine, jen la esprimoj por danki em kelkaj peruaj indiĝenaj lingvoj, kiujn oni instruis al mi:

Etnio:	Dankon!
Shipiba	Irake!
Awajun	Shixuasha!
Kukama	Usurupaqui!

Bora                      Teéhdújúkuú!

Yagua                    Kiñijuú!

Bonvolu ne petu al mi prononci ilin!

### **5) Alkroĉitaj Dokumentoj:**

- Dokumento por materialoj necesaj por akreditiĝo al venontaj COP;
- Fotoj de COP20;
- Flug-folio en la hispana de la Ministerio pri Kulturo de Peruo informante pri la indiĝenaj lingvoj de la lando (“10 aferoj, kiujn vi devus scii pri la peruaj indiĝenaj lingvoj kaj siaj parolantoj”);